

Estar^{to}

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1980·2·(78)

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - facila muntado
au sur submuro au sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga
tempo

1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, a telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.



Komenco
estis
antaŭ
tridek
kvin
jaroj

En la fina periodo de la dua mondmilito aktualigis preparo de ermita ribelo en la ĉeĥaj landoj, kie ankoraŭ persistis la okupaciaj armeoj de la faŝista Germanio.

En marto-aprilo 1945 la rezistmovado sukcese organizis partizanegan agadon, kiun helpis la trupoj pareasutigitaj el Sovetio. La partizanoj detruadis fervojliniojn, entreprenante atakojn kontraŭ neampleksaj germanaj formacioj. Paralele kun la partizana agado kreskis ankaŭ tiu de la politika rezistmovado - estigis novaj kaj novaj revoluciaj naciaj komitatoj, uzinej konsilioj k.ŝ.

Komence de majo 1945 eksplodis ribeloj en plurej ĉeĥaj kaj moreviaj urboj/ Slovakio estis tiutempe jam liberigita/. La 5-an de majo ankaŭ en la ĉefurbo Prago - ĝin direktis Ĉeĥa Nacia Konsilio kaj la gvidantaro de komunistaj partio. La 6-an de majo aperis Rudé právo, gazeto de KPC kun la alvoko batalibatali kontraŭ okupaciantoj. La heroo batalo de la ĉeĥa kaj slovakaj popoloj finigis la 9-an de majo, kiam Ruĝa Armeo rompis reziston de la germanaj taktantoj sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio kaj eniris Pragon.

-O.K. -

Aŭtume de 1979 nia aktorino Eva Seemannová kaj poeto Jiří Karen organizis du amikajn kunvenojn kun ĉeĥaj verkistoj - aŭtoroj jam spertaj kaj aŭtoroj nur komençantaj - al kiuj la organizintoj montris, kiamaniere Esperanto povas utili al ilia arto kaj al la tuta nacia kulturo. La interparoloj vekis intereson de la artistoj pri traĝkado en la internacian lingvon kaj el ĝi en la ĉeĥan, ankaŭ pri originala Esperanto-verkado kaj pri la ideo fondi skolon de ĉeĥaj Esperanto-verkistoj.

NIAJN LITERATURISTOJ


Daŭran kunlaboron promesis dek poetoj /inter ili la meritplena artisto František K o ŝ í k/ kaj, se ni alkalkulos Esperanto-aŭtorojn kaj tradukistojn, eblas esperi, ke baldaŭ formigos kolektivo de dudek verkipovaj kunlaborantoj. Novajn talentojn kaj kunlaborantojn oni serĉos pere de literaturaj konkursoj.

La artistoj preparas por unuopaj lokaj grupoj ankaŭ literaturajn vesperojn. En Pardubice okazis deklamado de kontraŭmilita Esperanto-poezio kaj en Havlíčkův Brod oni diskutis kun verkistoj František Lazecký kaj inĝeniero Vidman.

Aktorino Eva Seemannová deklamis en Prago, Erno kaj Roudnice nad Labem poezion de Jiří Karen, nome lian poezion ciklon pri la granda pola komponisto Frederiko Chopin "Serĉado de blua tono". Ĝi estas ampleksa mozaiko de vivmomentoj de la granda komponisto: montras liajn renkontiĝojn kaj amojn, venkojn kaj malvenkojn, aplaŭdojn kaj laurojn, kaj proksimiĝas al la leganto /aŭ aŭskultanto/, lian privatan vivon.

La aŭtoro de la ciklo, Jiří Karen, membro de la Asocio de Ĉeĥaj Verkistoj kaj de ĈEA, apartenas al tiuj poetoj, kiuj artisme plenumiĝis en la lastaj jaroj. Ĉiuj poemkolektoj de la poeto aperis dum la pasintaj ok jaroj kaj montras, ke li estas homo sperta, kiu scias sentoplene esprimi sian filozofian vidpunkton pri la moderna vivo.

Ni povas esperi, ke la nova aktivado de artistoj-esperantistoj riĉigos nian kulturen vivon kaj akcelos la aŭtoritaton de nia movado.




11

NEDERLANDO /1597/



12


FRANCIO /1789,1794/




13

ITALIO /1796/
oficialigita 1861

La flago de Nederlando /Unuiĝintaj Provincoj - fig. 11/ dum la revolucio kontraŭ hispanaj Habsburgidoj fariĝis kelara modelo per franca revolucia flago /fig. 12/. La koloroj de nederlanda flago signifas: 1-a strio orange - livrekoloro de la dinastio Oranje /pre "konebleco" en 1630 ŝanĝita je la ruĝa/; 2-a kaj 3-a strioj blanka kaj blua - simbolo de "libera komerca navigado sur maro". La koloroj de franca flago /fig. 12/ ne signifas "liberecon - egalecon - fratecon", sed kunigitajn kolorojn de Parizo /ruĝa-blua/ kaj de Bourbon-dinastio /blanka - la reĝo Ludoviko la XVI-a pretime simpatiis kun revolucio/. Franca flago estis modelo per la itala /fig. 13 - la kolorojn laŭlegende proponis mem Napoleono - lia ŝtata koloro estis verde, "simbolo de libereco"/. Sed ankau oni asertas, ke la koloroj estis prepenitaj lau la uniformoj de lia "lombarda legio".




14

RUSA SOVETA
SOCIALISMA RESP.
ŝtatflago /1918/RUSA SOVETA
SOCIALISMA RESP.
militŝipara /1918/


15

SOVETUNIO
ŝtatflago /ekde 1923/

16



MAROKO



SENEGALIO

17

18

UNUIĜINTA ARABA RESP.
/"panarabaj" koloroj/
1958 - 1961

19




SIRIO /1963-1971/

20



IRAKIO /ekde 1963/

21

LIBERIGA ORGANIZAJO
DE PALESTINO

22

blankan-ruĝan-bluan. En Ĉeĥoslovakio la ŝtatflago ne rajtas esti kovrita per iu ajn alia dekoraĵo, emblemo de organizaĵo, entrepreno ktp. Male en Skandinavio la ŝtatflagoj estas uzataj ankaŭ dum familiaj festoj /vidu en Danlando la junularverkojn de Karin Miĥaelis aŭ en Svedio la filmon "Miĥaelo ordigas"/.

Iom alia situacio estas en movada, korporacia aŭ urba vivo. Ĝi devenas el la epokoj de religia reformismo kaj renesance. Ĝenerala malstreĉiĝo sentebla en la progreso de ĉiuj ĝis tiam "malaltrangaj" sociaj tavoloj /metiistoj, kamparanoj, urbanoj aŭ malaltrangaj klerikuloj/ permesis grandan disvolviĝon de nearistokrataj kaj neekleziaj simboloj.

Simbolo de urba suvereneco kaj potenco komence estis **u r b a s i g e l o** /fig. 7/. El ĝi evoluis urba **b l a z o n o** /fig. 8/ - kaj pli poste la kolora paletro tre plibuntigis. En urbaj blazonoj - ni ne scias precize, kiam unuafoje - multe estiĝ uzata ankaŭ verda koloro. La blazonojn de urboj ni hodiaŭ povas vidi ĉie: ekz. ili fariĝis oftaj simboloj - kaj dekoraĵoj - de turismaj propagandiloj.

La klas- kaj naci-liberigaĵ movadoj ekuzis siajn simbolojn jam fine de la mezepoko: ni ĉeĥoj bone konas ruĝan kalkan sur nigra fono /fig. 9-10/ - simbolon de la husana revolucio. La servutuloj ribelantaj en Germanio elektis "kamparanan ŝuon" sia simbolo. Kaj Granda Franca Revolucio /fig. 11-13/. Ĝia unua simbolo estis - la **v e r d a** koloro de la folioj forŝiritaj de la arboj ĉirkaŭ la rivero Sejno la 12an de julio 1789. Sed jam dum sekvinta tago tiu ĉi simbolo malaperis - ĉar ĝi fakte estis heraldika atributo de la pli junaj princoj de Bourbon /de la koloro de malamiko/.

La ruĝa koloro - klasika heraldiko atribuas ĝin sole al reĝoj laŭ romaj imperiestraj togoj - fariĝis sankta koloro de revoluciuloj kaj koloro de batalanta laborista movado. Unuafoje ĝi estis uzita jam en la XVI-a jarcento dum Kamparana Milito en Germanio - kiel oficiala simbolo de revolucio en 1789 kaj 1832 en Francio. Komunumo de Parizo en 1871 deklaris ĝin sia simbolo kaj revolucia Ruslando /fig. 14-15/ same kiel Sovetunio /fig. 16/ ekde 1923 uzas ĝin kiel oficialan ŝtatsimbolon. Post la IIa mondmilito preskaŭ ĉiuj novaj ŝtatoj naskiĝintaj el naci-liberiga movado motivas la uzon de la ruĝo sur siaj flagoj kiel simbolon de revolucio.

Klasikaj heraldikaj koloroj estas blanko /arĝento/, flavo /oro/, ruĝo, bluo, nigro, verdo kaj purpura ruĝo. Kvankam la verdo sufiĉe frue penetris en heraldikon, oni komence penis eviti ĝin - ĉar laŭ heraldika regulo de "konebleco" ĝi povas saĝni blua.

Kion signifas la **v e r d a** koloro? Klasika heraldiko atribuas al ĝi planedon Venuson kaj gemon smeraldon. Soveta veksilologiisto Ivanov citas heraldikiston Anselmon /bedaurinde sen dato/, ke la verdo signifas **e s p e r o n**, abundecon /verŝajne ankaŭ fekundecon/ liberecon kaj ĝojon. Vidu,



23

ETIOPIO /1894/
/sen blasono de '75/

24

GANAŬO /1957/




25

KAMERUNIO /1957/
lasta desegno
/stelo ekde 1975/

26

Pruslando




27

Nordgermana Unio /1867/
IMPERIO GERMANIO /1871/


28

Hanza-urbo Lubeko




29

Brabanto



30

BELGIO /1831/



31

Henegovie



32

PAKISTANO
/"tarten"-verda/


33

ŠKODA

34

Normigita fabrik-marke **ŠKODA PLZENĚ**35. Ĝusta desegno de la Esperante-flago
/laŭ Jarlibro de UEA 1970/:

La estrare de UEA decidis rekomendi, ke ĉiuj Esperante-flagoj konfermiĝu al la jenaj proporcioj:

Longo:larĝeco:latero de blanka kvadrato = 3:2:1
Latero de blanka kvadrato : Radio de la cirklo
ĉirkauskribebla ĉirkaŭ stelo: 10 : 3,5

kiom antikva estas la signifo de espero en la verdo! Sed mi citis nur unu aŭtoron - la modernaj heraldikistoj evitas tiujn ĉi klarigojn, ĉar dum jarcentoj aperis multaj aliaj opinioj. Kaj pri la signifoj de la koloroj en heraldiko kaj veskilologio validas - multe pli ol alie - fama Esperanta pro- verbo "Kiom da kapoj - tiom da ĉapoj".

Kutime oni opinias, ke la verdo estas la plej ŝatata ko- lora de araboj kaj islamanoj. Jes, ĝia signifo estas p a - c o / = "islam" / kaj ĝi fakte estas simbolo de paca frondo /malo de bastonego = simbolo de milito/. Laŭ legendo verda estis la turbano de Mahometo, kiu levinte ĝin per bastono tiel signalis al siaj samideanoj. Sed ĝi estas nur legendo - fabelo, unu el tiuj, sen kiuj la tuta heraldiko estus anuiga scienco. El arabaj dinastioj pli poste uzis la verdon sole Fatimidoj.

Kaj la v e r d a stelo? Vidu la flagon de Maroko /fig. 17/: sur ruĝa tukoj en centro verda zigzaga stelo - laŭ le- gendo sigelo de Salomono. /La flago estas uzata ekde 1912/. Senegalio /fig. 18/ uzas la verdan stelon sur sia tricolora flago /verda-flava-ruĝa/ ekde 1960. Du verdajn stelojn - la simbolon de egipta-siria federacio - uzis Unuiĝinta Araba Respubliko 1958-1961 /fig. 19/; tri verdajn stelojn uzis Sirio /fig. 20-1963-1971/ kaj Irako /fig. 21/ ekde 1963 /sim- bolo de neefektiviĝinta, sed intencata federacio Egiptio-Sirio-Irako/. En Sirio la steloj estas verdaj, ĉar ili estas "en koloro de la araba revolucio" - en Irako ili simbolas "ŝatatan koloron de la profeto Mahometo"/au tri irakajn provincojn/. Post egipta perfido de la araba revolucio iom post iom malaperas "panarabaj koloroj" /en kiuj mirige mankas ofte la verdo - ili estas nur ruĝo, blanko kaj nigro/ kaj estas uzata denove la verdo: ekz. Libio nun uzas sole verdan tukon sen iu ajn emblemo. La panarabajn kolorojn /komune kun Kuvajto, Unuiĝintaj Emirlandoj, Jemeno kaj aliaj/ uzas ankaŭ Liberiga Organizaĵo de Palestino /fig. 22 - kun ruĝa kojno ĉe masto/. Ankaŭ Egiptio revenis al sia malnova verda flago kun blanka krescento kaj tri blankaj steloj en centro. Res- publiko Jemeno uzas unu verdan stelon en centro de "panara- baj" koloroj ekde 1962 - tie la verda stelo signifas "unu- eca, sendependecon, fekundan naturon kaj prosperon de la res- publiko". Laŭ etiopia modelo /fig. 23-25: verda-flava-ruĝa/ multaj ŝtatoj en Afriko ekuzis la samajn kolorojn sur siaj flagoj ekde 1960 - kaj ili fariĝis "panafrikaj". La verdo tie estas klarigata laŭ du ideologioj: kie regas islamismo, ĝi estas "islama" koloro; en la aliaj landoj ĝi signifas plejparte "fekundecon" de koncerna lando. La flavo preskaŭ ĉie signifas "varmegan afrikan sunon" au "riĉecon de naturaĵoj" kaj la ru- ĝa preskaŭ senescepte revolucion.

La epoko de kapitalismo, ĝisvolviĝanta trafiko kaj komer- co /kaj en nelasta vico ankaŭ la u l t l i n g v e c o / postulis pro pure racionalismo ankaŭ simbolojn - kaj la ko- loraĵoj tiam ricevis - ofte kontraŭan signifon: ekz. la ruĝo, simbolo de progreso, fariĝis koloro por ĉiuj malpermesoj au

/estonte daurigota/

Printempa kunsido

Fine de februaro kunvenis membroj de Centra Komitato de CEA por sia regula kunsido. Kunsidon partoprenis ankaŭ gastoj el GDR - d-ro Detlev B l a n k e kaj ing. Werner Plate, ambaŭ membroj de Centra Laborrondo de Esperanto.

Unutaga kunsido traktis la raporton pri asocia agado dum la 1979-a jaro, pri ekonomia kaj organiza situacioj, pri laborplano de Centra Revizia kaj Kontrola Komisiono por la jaro 1980.

Kiel dum la sama tago en Slovakio, estis ankaŭ akceptita Interkonsento pri starigo de Ĉeĥoslovaka komitato de Esperantaj Asocioj. Estis do fine aprobita konvena maniero por federacia kunlaboro.

Estis akceptitaj decidoj pri delegita reto de UEA kaj membroj estis informitaj pri la kaŭzoj kaj bezono ŝangi elekton de individuaj membroj kaj delegitoj de UEA.

La membroj de CK estis ankaŭ informitaj pri kaŭzoj, kiuj gvidis Kulturán Domon en Vepřín haltigi agadon de nia Loka grupo tie. Ĉar temas pri kaŭzoj, kiuj fontas el nedisciplinista agado de la prezidanto de LG kaj ne de la membroj, CK ne konsentas kun la decido kaj komisiis s-anojn Pisk, Papírník kaj Vodráková esplori la situacion kaj trakti kun la KD.

Kun grava intereso la membroj de CK konatigis kun organiza strukturo de germana esperantista organizo kaj kun la labortrajtoj de ilia CLE.

Do, la kunsido estis vere laborplena. Sur la fotoj estas parto de la estraro kaj d-ro Blanke dum sia prelego.



LETERO EL HANOI



En februaro ni ricevis leteron de la direktorino de Hanoi-a lernejo. Ŝi dankas en la nomo de geinstruistoj kaj geler-nantoj por nia helpo kaj iomete prezentas le lernejon NGO SI LIEN. Nomo de la lernejo estas laŭ ilia fama historiisto.

La lernejo situas en la centro de Hanoi kaj laŭ 7 - klasa sistemo estas instruataj ĉirkaŭ 1400 geknaboj./Do laŭ niaj mezuroj tio estas nevidebla nombro - rim.de la red./

Multaj el la frekventintoj nun estas konataj sciencistoj, laureatoj. La direktorino skribas, ke niaj kajoroj jam pleni-gas de vjetnamiaj literoj kaj desegnaĵoj de la infanoj. Ŝi promesis sendi kelkajn el leteroj kiel memoraĵon al ni. Nia ekepozicio pri Vjetnamio ricevos do novajn materialojn, kiuj dokumentos nian komunan amikecon kaj praktikan formon de la kunlaboro.

Ne forgesu ankaŭ ĉiu el vi, ke ni volas ĉi-jare denove sa-me helpi ilin. Vi povas aŭ sendi monon al nia asocio / por speciala tiucela konto / aŭ sendi lernejmaterialejn...kaje-rojn, skribilojn ktp. Ni esperas, ke estos nek unu nia memb-ro, kiu rifuzus helpi.

Sur unu foto vi vidas enirejon en la lernejon, sur la dua instruistinojn kaj la direktorinon HOANG MINH CHAU dum la transpreno de nia donaco pasintjare.

La letero finas per jenaj vortoj: Okaze de nova jaro 1980 ni deziras al vi, al ĈEA, feliĉan vivon, novajn kaj pli vas-tajn sukcesojn en via nobla laboro. Vivu la amikeco inter Vjetnamio kaj Ĉeĥoslovakio!



el leterkesto



PREPARATA GRAVA EKSPozICIO EN ROSTOV-DON

Verkajojn kaj nigroblankajn grafikaĵojn de 12 - 16 jaraj lerneĵanoj kolektas E-klubo en Rostov - Don "Amikeco" por organizi ekspoziciojn kaj seriojn da artikoloj en junularaj ĵurnaloj, lernejoj ktp.

T e m o j :

I. Omaĝe al la 110-jara datreveno de Lenin-naskiĝo /22.4.1980/:

1. Lenin vivos ĉiam
2. Nia lando marŝas laŭ la vojo de Lenin
3. Nia forto - amikeco /pri amikeco kun USSR/
4. Sovetunio - lando de Lenin
5. Vizito de Lenin en nia lando aŭ urbo

II. Omaĝe al la tago de pioniroj /19.5.1980/

1. Nia pionira taĉmento
2. Pioniroj - herooj
3. Sovetaj pioniroj - miaj amikoj
4. Al kiu pioniro mi volus simili
5. Miaj rememoroj pri Artek

III. Omaĝe al la internacia tago de infanoj /1.6.1980/

1. Kiel kaj kiajn mi edukos miajn infanojn
2. La plej interesa okazintaĵo en mia vivo
3. Pri kio mi okupiĝas en mia libera tempo
4. Pri kio en mia patrujo mi pleje fieras
5. Mia plej ŝatata libro kaj ĝiaj herooj
6. Kiel pasis la jaro de infano en nia lando aŭ urbo

N o t o j : La verkoj estu en Esperanto aŭ la rusa /eblas, ke ni ricevu tradukon far instruisto/.

Bonense aliaj similegpiritaj temoj.
Kreaĵoj pri temoj daŭre aktualaj estas bonvenaj ankaŭ post la indikitaj datoj.
La plej aktivaj partoprenantoj ricevos premiojn.

La a d r e s o : M e l n i k o v A.S. SU - 344007
Rostov - Don - 7 , p.k.393 Sovetunio



UNUA RENKONTIĜO EN T A Ŝ K E N T O

La 15-an kaj 16-an de decembro 1979 en Taŝkento estis la Unua Respublika Esperantista Renkontiĝo, kiun partoprenis pli ol 50 geesperantistoj el Taŝkento kaj Samarkando. La renkontiĝo estis dediĉita al la 120-jara naskiĝtaga datreveno de L.L.Zamenhof.

Dum du tagoj en Taŝkenta Esperantista klubo funkciis ekspozicio de E-libroj kaj fotoj pri agado de la kluboj en ĝmblu urboj kaj ekspozicio de protestleteroj kontraŭ nukleaj armiloj kaj militoj.

La solena kunveno, la koncerto kaj la "interkona teatrinkado" estis filmitaj por Uzbekistana televido. Brodkastitaj ili estis la 16-an de decembro en la dua Uzbekistana programo.

Poliŝčuk-Masalkin

Eva Seemannová kiel "Jutiferino" en eminenta verko de aŭtoro V. Vinar.



Eva SEEMANNOVÁ vivjubileis

Artistino en vasta Esperantujo bone konata, laŭ inatigo de de fama Julio Baghy la 16-an de decembro 1954 en Esp. Klubo Praha dum solena vespero anoncas la fondon de "Verda ĉaro de Julio Baghy" por dissemi belarton. Sed jam multe pli frue ŝi kun sia artkolektivo, aŭ sola, disdonadis ĉu en EK Praha, ĉu en la Kolegio Doksy, poste en SET Lančov aŭ dum dekoj da aliaj aranĝoj /Varsovia UK, en GDR, vesperoj en niaj lokoj/la perlojn de nia aŭ fremda literaturo, ofte propre esperantigitajn /H.Ibsen: Nora, kiel unu el pluraj/.

Sed ni ne forgesu ankaŭ ŝian originalan poezion aŭ teatraĵojn, dum kiuj ofte kunhelpis ŝia neforgesebla edzo Antonio. Ni rememoru nur ekz. unuaktan dramon el la vivo de L.L. Zamenhof "Mi esperas", en kiu Eva ludis lian edzinon.

Neniam ŝi sentas sin laca, ĉiam ŝi pretas helpi, kie mon-
triĝas bezono.

Kaj nun? Same laborema, diligenta kaj ĉiam originale. Ni
menciu ŝin /kun membroj de Verda Ĉaro de J.B. aŭ kun junvi-
rina ensemblo/ en la kulturaj matineoj en Mělník, en multaj
enlandaj EG, kie ŝiaj vesperoj de poezio /ekz.Havl.Brod/ ha-
vas sian eĉ neesperantistan vastan publikon.

Eva Seemannová vivjubileas. Kaj ni ĉiuj, kiuj admiras ŝian
arton, deziras al ŝi plenan sanon, daŭran ridemon kaj opti-
mismon por povi ankoraŭ longe disdonadi siajn juvelojn.

▶ ▶ ▶ INTERNACIA KONKURSO DE INFANAJ VERKOJ ◀ ◀ ◀

Esperanto-klubo "Bialystok", B. Markača 1, en DJURDJEVAC
/YU- 3350/ kunlabore kun Memmastruma Interes-Komunumo por
Kulturo kaj Komunuma Konferenco de Asocio de Socialisma Jun-
nularo m a l f e r m a s

Internacian Konkurson de infanaj verkoj.

La konkurso estos duparta:

1. Por originalaj verkoj en Esperanto
2. Por tradukitaj verkoj en Esperanton el diversaj mondiaj lingvoj.

K o n d i ĉ o j:

1. Partopreni povas ĉiu infano tutmonde ĝis 17-jaraĝa.
 2. Partopreno estas ebla por ĉiuj esperantistoj, kiuj kapab-
las esperantigi iun infanan verkon.
- Temo de la konkursaĵoj estas libera
 - Nombro de konkursaĵoj ne estas limigita
 - Konkursi povas kaj poeziaĵoj kaj prozaj verkoj
 - Ĉiujn ricevitajn konkursaĵojn trarigardos internacia ju-
rio, kiun konsistigas: Jim Cushing /Usono/, Roger Imbert
/Francio/, Spomenka Štimec /Jugoslavio/ kaj reprezentanto
de Esperanto-klubo "Bialystok".
 - La konkurso daŭros ĝis la 31-a de decembro 1980
 - Ĉiuj verkoj estas sendendaj al la adreso de Esperanto-Kl.
"Bialystok"
 - La jurio elektos la plej bonajn verkojn, kiuj poste ape-
ros libroforme
 - Kune kun ĉiu konkursaĵo oni devas sendi: nomon, adreson
kaj jaraĝon de la aŭtoro, nomon, adreson de la tradukinto
kaj la nomon de la lingvo, el kiu la verko estas traduki-
ta.

KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj
tipoj

tondiloj por la kureja prilaboro
de kortbirdoj

higiena ilaro - ungo-fajliletoj

- raspiletoj por la
malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR

Eksportas MERKURIA Praha

Premioj:

Surbaze de la ĵuria decido estos premiataj la plej bonaj verkoj. Ĉiu premiita verkanto ricevos ekzempleron de la libro, en kiu lia verko aperis kaj ĉiuj aliaj partoprenintoj de la konkurso ricevos memor-diplomon de la Komunuma konferenco de Socialisma junularo.

DARY SVAZU

Červenka M.16,-Kčs, David J.A.
135Kčs, J. Ptok 5,-Kčs.
M.Čekal, Děčín Kčs 30,-Eva
Bašiková, Praha 100,- Kčs
Jablonec 350,- Ark.J. Drlik
255,- A.Bombionka, Frýdek -
Místek 10,- A.Sture, Zlou-

kovice 30.- J.Chvosta, Po-
děbrady 20,- O.Dibelka el
Skalice 10,- R.Surý, Ostra-
va 7,- Fr.Mančík, Slavkov
30,-.
Koran ĉankon al ĉiuj ĉona-
eintoj.

JUNULARA SEMINARIO

En la tagoj 14.-16.3. 1980 okazis en la sudmoravia urbeto Valtice la printempa junulara seminario 1980, la dua de la seminario ciklo por estontaj funkciuloj.

En la agrabla medio de la kastelo en Valtice la junaj aktivuloj aŭskultis prelegojn pri jenaj temoj: Fundamento de Esperanto; neutraliteco de UEA; Esperanto-asocioj; ekonomio kaj budĝetoj de nia asocio; laborjunaj rilatoj; kiel informi pri Esperanto. Prelegis s-noj ĉ-ro Jermář, Krimský, Podhradská, Pokorná kaj gasto el GDR s-no Hayman.

La seminarion partoprenis ankaŭ reprezentantino de la slovakaj junularo Anna Iváková, kiu konigis la aŭskultantojn pri situacio en Slovakio. En oktobro 1979 estis fondita junulara sekcio de AE SSR. Kiel prezidanto estis elektita Stano Marček. La slovakaj geamikoj invitas niajn esperantistojn al SELKO Košice 1980 (okazos 12-25.7. 1980; aligu ĉe Esperanto-klubo, Dom u menia, Dr. E. Erby, 041 23 Košice) kaj al Turisma Semajno (TUSSE) en la Slovaka Paradizo (10.-16. 8. 1980; aligu ĉe Peter Pavuk, Konrádova 6, 052 01 Spišská Nová Ves).

La autunan seminarion la Junulara Komisiono preparas por la tagoj 28. - 30. 11. 1980, denove en la kastela hotelo Hubertus en Valtice.



R E Z O L U C I O

de II-a RENKONTIĜO DE PACDEFENDANTOJ la 15-an de marto 1980
en KULTUR-DOMO de Revolucia Sindikata Movado DUKLA, PARDUBICE
en C S S R

Partoprenantoj de II-a renkontiĝo de Pacdefendantoj, okazinta la 15-an de marto 1980 en KD de RSM DUKLA en Pardubice, pritakis nuntempan dangeran politikan situacion en la mondo kaj plene subtenas rajton de homo je mondo sen militoj, ĉar tia mondo respondas al interesoj kaj vivbezonoj de ĉiuj nacioj kaj de ĉiuj landoj.

Partoprenantoj rifuzas alvokon de prezidento de USONO sinjoro CARTER kaj lian bojkotadon de someraj olimpikaj ludoj, kiuj devas antaŭ ĉio helpi al pliproksimigo de nacioj.

Plene kondamnas la decidon dislokiĝi novajn usonajn rakedojn de meza atingpovo en okcidenta Eŭropo kaj kontraŭstaras militan doktrinon de histeria kaj febra armigo.

Partoprenantoj de la renkontiĝo konstatas, ke

- postulo konservi pacoŝan havas tutmondan karakteron kaj internacia paca movado havas nuntempe nekompareble pli firmajn poziciojn ol en estinteco,
- ekzistas fortoj, kiuj klopodas gajni regadon super tuta mondo kaj por tiu celo elspezas grandegajn financajn rimedojn, kiuj povus esti uzitaj por forigo de homa mizero kaj subpremado,
- por certigo de paco, plifirmigo de sekureco inter nacioj kaj haltigo de febra armigo estas nia devo gvidi konstantan batalon.

Tiukauze partoprenantoj de la renkontiĝo alvokas al ĉiuj ESPERANTISTAJ ORGANIZACIOJ DE LA MONDO, al ĉiuj iliaj membroj, ke ili plene uzu esperanton tiel, kiel estis destinita de glia iniciatinto Dro L.L.Zamenhof, al interkomprenigo inter nacioj kaj sekve de tio al batalo por certigo de monda paco, plifirmigo de sekureco inter nacioj kaj haltigo de febra armigo. Kontraŭ doktrino de milita histerio starigu doktrinon de konsekvenca batalo por paco kaj sekureco en la mondo.

Sekve de tio plene subteni kaj plifirmigi poziciojn de forto, progreso kaj paco en la mondo, plilargigi niajn vivojn, pliprofundigi kaj pliperfektigi interŝanĝon de informoj kaj serĉi novajn vojojn kaj eblecojn de reciprokaj renkontiĝoj kaj per tio kontribui al vera proksimigo kaj interkomprenigo inter nacioj. Per niaj eblecoj ni kontraŭstaru al tiuj fortoj, kiuj alproprigas al si rajton artefarite fremdigi la naciojn kaj vekigi novajn malamikecojn.

Ni, partoprenantoj de hodiaŭa paca renkontiĝo, alvokas tutmondan esperantistaron, ke ĝi staru kontraŭ ĉiu, kiu realizadon de tiuj pensoj malsukcesigus.

Partoprenantoj de II-a paca
renkontiĝo en Pardubice.



Parolas s.Helmuth Fuchs el Pir- Ĉefreferaĵon prezentas la pre-
na GDR membro de CLR en Berlino, zidanto de Paca sekcio de ĈEA
konata kontraŭfaŝisma aganto Drahomír Kočvara

Dua renkontiĝo de Pacdefendantoj en KD ROH DUKLA
la 15 de marto 1980

Jam tradician renkontiĝon partoprenis nunjare elstaraj funkcio-
uloj de paca movado ing.Jaromír Horák, prezidanto de Distrikta
packonsilantaro en Pardubice, Zdena Huňáčková, prezidantino de
Regiona packonsilantaro en Hradec Králové, Josef Bartůněk, di-
rektoro de Kulturdomo de revolucia sindikata movado DUKLA kaj
134 gepartoprenantoj el diversaj rondetoj kaj lokoj en ĈSSR.
La programon lerte gvidis s.MUDr Mirko Hendrych, la vicprezi-
dante de Esperanto klubo Pardubice. Pri tutmonda paclaboro pa-
rolis s.Dr Imre Pethes, prezidanto de MEM kaj membre de Tutmen-
da packonsilantaro el Budapeŝto. Tre interese prelegis s.Hel-
muth Fuchs, membro de CLR en Berlino. La Ĉefreferaĵon pri akti-
veco de Paca sekcio de ĈEA prezentis ĝia prezidante Drahomír
Kočvara.

Postagaze estis dediĉita al kultura programo en kiu elstaris
kontraŭmilita poemo de Jiří Karen kaj teatraĵo de Václav Vi-
nař "Konfeso de edzino de Putifar", prezentita brile de Eva
Seemanevǎ. La prelegintoj estis akceptitaj de la prezidante de
Nacia komitato Jaroslav Šimon, kie estis diskutitaj en amika
etose reciproke interesaj problemoj. Poste ni vizitis "Zámeček",
kie ni metis florojn al monumento, kie estis dum faŝisma oku-
pacie mertaŝitaj ĉiuj legantoj el vilaĝo Ležáky. En kulturde-
mo estis inaugurita interesa ekspozicio de solidareco pri Vjet
noma socialisma respubliko, kiun preparis lokaj esperantistoj.
Dum komuna vespermanĝo ni ĉiuj alte taksis bone preparitan a-
ranĝon, kiu mentris al aliaj esperantistoj, kiel praktike uzi
Esperanton per paca batalo. Je la fine ni akceptis rezolucion,
kiu esti dissendita al ĉiuj pacorganoj kaj esperante asocioj
en la tuta mondo.

Estimataj Gesamideanoj,

venas al ni la jubilea jaro - antaŭ 35 jaroj finiĝis la plej terura milito en la tutmonda historio. Soveta Armeo liberigis ĉeĥoslovakan ĉefurbon Pragon - kaj nia popolo ekkonstruis fundamenton de pli justa socio. La 9-a de majo 1945 fariĝis ne nur nia festotago - ĝi estas ankaŭ festotago de la paco en Eŭropo. Tiam la pabatalantoj ĵuris elradikigi kultipinton de la milito - faŝismon. Tiam nia popolo liberigis ne nur de la faŝismo, sed ankaŭ de la ekspluatado. Tiam socialismo ekmarŝis la gloran vojon de sia venko. Kaj antaŭ kvin jaroj en Helsinko la reprezentantoj de ĉiuj eŭropaj landoj promesis solvi ĉiujn problemojn egalrajte sur bazo de paco. Ĉar ĉiuj supre menciitaj ideoj egalas al tiuj de Esperanto, ni rekomendis al vi la 9-an de majo digne memori en viaj propagandaj kestoj kaj anoncie en asocia cirkulero "INFORMOJ" konkursan de propagandaj kestoj.

La Konkurs-kondiĉoj estas:

- 1/ La konkurso povas partopreni ĉiu loka grupo de ĈEA posedanta propagandan keston, vitrinon aŭ elmontran fenestron.
- 2/ La konkurso ne rajtas partopreni profesiaj propagandistoj kaj ankaŭ membroj de la ĵurio.
- 3/ La konkurso partoprenos ĉiuj aligitaj kestoj aranĝitaj speciale por memorigo de la 35-jara jubileo de nia liberigo ĝis la 30-a de aprilo 1980.
- 4/ La aligilo por la konkurso estas fotografaĵo de la propaganda kesto en la formato 9 x 13 cm /pli grandaj vitrinoj 13 x 18 cm/ sendita ĝis la 15-a de junio 1980 al adreso: Jaroslav Klement, kpt. Nálepky 7, 360 04 Karlovy Vary - Bohatice.
- 5/ En junio - julio 1980 la aligitajn propagandajn kestojn prijuĝos la ĵurio: Jaroslav Klement, Zdeněk Hrdel, Ing. Margit Strnadová, Jiřina Vondráková kaj Jiří Patera.
- 6/ La kestoj estos takataj laŭ:

a/	idea kaj politika direktigo	25	poentoj
b/	esprimo de la kunligo kun Esperanto-celoj	25	poentoj
c/	grafika aranĝo	25	poentoj
d/	pureco de aranĝo	25	poentoj

Sume eblas do ricevi 100 cent/ poentojn
- 7/ La rezultoj de la konkurso estos anoncigitaj en STARTO kaj en "Informoj de ĈEA" kaj aprezitaj per premioj :

1-a premio	300 Kčs
2-a premio	200 Kčs
3-a premio	100 Kčs

La ĵurio rezervas por si la rajton iun premion eventuale ne atribui aŭ kelkajn kunigi.

Vi jam nun povas kontroli kiel via loka grupo preparas la materialojn por sia kesto.

Jaroslav K l e m e n t , estro
de metodika-propaganda komisiono

Kiu vendos aŭ prontos jenajn malnovajn gazetojn:
PACDEFENDANTO n-roj 19-20 /julio-aŭgusto 1953/ kaj 30 /junio 1954/, **STARTO** n-roj 1 - 2 /okt., nov.-dec. 1968/ kaj 1 /jan. - feb. 1969/. Skribu al **Zd. Hršel, Botanická 28, 60200 BRNO.**

Hledáme spolupracovníky. Propagace a šíření mezinárodního jazyka potřebuje také širokou teoretickou základnu. Prvním předpokladem každé odborné práce je znát, co bylo v oblasti mezinárodního jazyka publikováno, přeloženo, zpracováno.

Československo je jednou z mála zemí, kde neexistuje vůbec bibliografie mezinárodního jazyka. Je nebezpečí, že po několika letech bude už těžko takovouto bibliografií sestavovat, neboť stále více mizí vzácné výtisky rozmanitých časopisů, knížky, které byly vydávány v malých nákladech apod. Hledáme už několik let obětavé pracovníky, kteří by pomohli zpracovat bibliografii o mezinárodním jazyku v Československu; je to práce nevědná, /samozřejmě neplacená/ ale zajímavá, poučná a svým způsobem vzrušující a objevná.

Pomozte a přihlaste se u: Komise pro teorii a dějiny mezinárodního jazyka **CES, Jilská 10, 110 00 P r a h a 1.**

ESPERANTO - VETERINARA ASOCIO aranĝos la unuan esperantistan renkontigon kaj sciencan prelegserion de esp. bestkuracistoj el la tuta mondo en **M i s k o l c /Hungario/** en la jaro 1981. Tial ni serĉas kontakton kun ĉiuj atingeblaj samfakuloj kaj ni esperas kaj atendas laran partoprenon /eĉ prelegon/okaze de la preparata renkontigo. Informojn: **D-ro Fehér Miklós, M i s k o l c 3531, Bársony János u.13 Hungario.**



Per ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turpigu al viaj perantoj pri detaloj informoj!

Mi aĉetos **PLENAN VORTARON** kaj **LA TUTAN GRAMATIKON.**
M. B a r o ŝ, Zápotockého 695, Valašské Meziříčí 757 01

Kiu korespondos kun lernantino de 8-a klaso, skribu al **B e n c z e Tímea, Pécs e 7629, Frankel Léo 6 sz., Hungarlando.**

Studento **František ONDRAŠ, Pulická 819 51801 DOBRUŠKA**
 Interesoj: fremdaj lingvoj
 Korespondado kun junaj homoj el tuta mondo. Respon-
 dos al ĉiuj.

22-j. dez.kor.kun t.m. Intereso: literaturo, filmo, turismo kaj moderna muziko
Mária Kovalíčková, 972 21 Nitranské Lučany 275 ĈSSR.

31-j.arkitekta fervoja teknikisto dez.kor.pri turismo, speleologio, arkitekturo, montgrimpado, muziko.
Győző Gaál, 4031 Debracen Ksonikas str.6.part.6.Hungario

27-j. infanĝardenistino edz.
 dez.kor. Ernoné Kolozsi,
 4400 Nyíregyháza, str. Krúdy
 40/c 2/6 Hungario

Novesperantisto dez.korespon-
 dendi kun ĝejnuloj. Adreso
 Kalin Parvanov Ivanov,
 str. Petar Beron No 22, 3400
 MIHAJLOVGRAD, Bulgario

ZOFIA WAWER/25-a jaraĝa frau-
 lino/Wroclaw, Powstancow Sla-
 skych 105/26, Pollando kun tu-
 te mondo pri erto, naturo k.a.

VINCENT POPOVIČ, 561 67 Mlad-
 kov, 45, ĈSSR/60 jar-aga/, inter-
 sangi BK kun floroj kaj birdoj

Interesa statistiko

Nia asocio jam kelke da jaroj organizas instruadon de Esperan-
 to far de korespondaj kursoj. Ni prenis hazarde el kelke da mi-
 loj da aligiloj 640 ekzempleroj kaj ni sumigis sur ili indi-
 kitajn datojn. Ĉu tiu statistiko montras ankau sociologiajn as-
 pektajn (ekzemple kiaj grupoj de niaj logantoj interesigas
 ankau pri Internacia lingvo) prijugu vi mem.

d a t o j n o m b r o
s e k s o

virinoj 249
 viroj 391

 s u m e 640

profesio

laboristo 103
 terkulturisto 22
 administra oficisto 103
 studentoj 104
 servoj 51
 teknikistoj 102
 pedagogo 38
 sciencisto 27
 dommastrino 31
 pensiulo 23
 ne indikis 36

 s u m e 640

ĝepatra lingvo

ĉ e ĥ a 570
 slovaka 63
 aliaj 7

d a t o j n o m b r o

aliginto regas
kromajn lingvojn

 rusa 457
 germana 217
 angla 127
 franca 57
 pliaj 32

ĝo /en jaroj/

ĝis 20 121
 20 - 30 261
 30 - 40 140
 40 - 50 40
 50 - 60 37
 pli ol 60 16
 ne indikis 25

 s u m e 640

Logloko -indikoj en miloj
da lozantoj

 ĝis 1 145
 1 - 5 98
 5 - 10 63
 10 - 30 121
 30 - 50 27
 50 - 200 62
 pli ol 200 125

 s u m e 640

Se ni, do, pli detale rigardos la numerojn estas videbla, ke ekzemple :

- virinoj pli interesigas pri Esperanto ol viroj
- preskaŭ saman intereseon pri kursoj havas laboristoj, administraj oficistoj, studentoj kaj teknikistoj
- ke pli ol du triono da gekursanoj konas almenaŭ unu lingvon krome de gepatra kaj unu triono konas du fremdajn lingvojn
- ke plejgranda intereso pri kursoj estas en ago inter 20 -30 jaroj
- ke plejgranda parto de aligitaj kursanoj vivas en malgrandaj vilagoj au urboj

Jes la sociologia esploro devas esti pli profunda kaj kun aliaj ankaŭ komparoj, se jam el tiuj informoj vi povus "desegni" la profilon de plejofta kursano (-inŝ) kiu aligas al nia respondaj kursoj.

- kŭz -

RONDETA. VIVO

FRÝDEK-MÍSTEK - En kafejo ESPERANTO parolis la 17.2. JUDr. Erich Kaplan je la temo: Famaĵ galerioj de Eŭropo. La prelegon kompletigis fotoj kaj publikaĵoj.

HAVLIČKŬV BROD - Komence de januaro anoj de la ER partoprenis la distrikтан konferencon de Interkluboĵ de Pionira organizo. Ni havis inform-paroladon pri Esperanto kaj prezentis unuan lecionon de la gramofona disko-kurso.

La 18-an de februaro okazis kutima Vespero de poezio, kiun aranĝas ĉiumonate "Klubo de Poezi-amikoj" ĉe Kultura klubo ČSD kaj kies programon plenumas jam 4-an jaron oferema honora membro de ĈEA s-anino E.Seemánnová. Tiun ĉi fojon akompanis ŝin la "Poeto de Vysočina", Jiří Karen. La

vespero estis omago al la 170-a datreveno de naskiĝtago de Frederiko Chopin. Tradicie altarte E.Seemánnová deklamis poemojn de la verko de Jiří Karen. Estis grend sukcesa vespero.
-eto

OPAVA - Sian pasintjарan laboron taksis membroj de la ER Ostroj dum sia ĵarkunveno la 12-an de februaro. Oni plus akceptis la ĉiјaran agadplanon, kiu estas ligita kun preparata IV. Esperantista Kultura Festivalo. La preparoj por ĝi jam sufiĉe progresis, Oni ankaŭ sufiĉis prepari kunlabore kun Memordomo de P. Bezruĉ por monato marto la vesperon de poezio de J. Karen. Grandan atenton de ĉiuj rondetanoj vekis la dokumenta libro pri atombombo, eldonita de japanaj esperantistoj. La rondeto esprimis sian dankon al la eldonintoj por ties grava paca aktiveco. /ko/

PREROV - la 5.2.1980 aranĝis EK vesperon pri la 64-

a UK en Lucerno. Parolis kaj multajn diapozitivojn prezentis s-ano D.Kočvara. Post la parolado ekestis vigla diskuto.

Bonan kunlaboron de la EK kun aliaj kluboj pruvas la projekciado de esperanta versio de filmo "En la signo de Neptuno", farita de la filmklubo ĉe Přerov-aj Maŝinfabrikoj. La vere bonan tradukon kaj paroligon en la internacian lingvon preparis membroj de EK. Kurson por komencantoj ekde oktobro gvidas s.Chytil kaj partoprenas ĝin plurej

filatelistoj, dezirantaj plivastigi siajn kontaktojn kun filatelistoj el diversaj landoj de la mondo. -JT-

ZNOJMO - La klubo aranĝis publikan paroladon de s-ano V.Rotrekl pri la libro Hiroŝima-Nagasaki, ligitan kun ekspozicio de bildkartoj el Japanio. Granda partopreno ankaŭ de gastoj. Simile sukcesa estis KUBO-rakontado kun koloraj lumbildoj de s-ano Polák, kiu la landon vizitis. La vespero okazis la 21.2.

turistiko

VIZITU KUN NI BELAJN LOKOJN EN NORDA BOHEMIO

25.5. 1980 - dimanĉo Esperanto-rondeto Turnov

Turnov ĉefa stacidomo 9,30 horo

15 km Turnov-Valdštejn-Hrubá Skála-Sedmihorky -
Valdštejn-Hlavatice-Turnov

25 km Turnov-Valdštejn-Hrubá Skála-Trosky-Nebákov
-Věžák-Nouzov-Valdštejn-Hlavatice-Turnov

Organizas s-ano L.Obruča, t.ř.R.armády 1550 51101
T u r n o v

14.6. 1980 - sabato Esperantista-klubo Semily

Semily stacidomo 8,30 horo

15 km Semily-Krkavčí skály-Železný Brod-Podspálov
-Riegrova stezka-Semily

25 km Semily-Kozákov-Dlouhý-Železný Brod -Podspálov-
Riegrova stezka-Semily

Organizas s-ano Radmil Stínil Lišný 46822 Železný
Brod

21.6. 1980 - sabato Esperanto-rondeto Desná v Jiz.
Horách

Tanvald ĉefa stacidomo 8,00 horo

20 km en la Jizera montaro

Organizas s-ano Josef Rezáč Výšina 533 46841
Tanvald

6.9. 1980 - sabato Esperanto-klubo Liberec

Liberec ĉefa stacidomo 8,30 horo

18 km Liberec-Ještěd-Pláně tur.kabano-monumento de
laborista movado-Hluboká-Horní Hanychov-Li-
berec



ŠPORTOVÉ POTREBY



v hotovosti
i na doplnkovú pôžičku
ponúkajú predajne ŠPORT,
podniku

**DROBNÝ TOVAR
BRATISLAVA**

BIŽUTÉRIA

ZVYŠUJE

VÁŠ

PÔVAB



vo veľkom výbere
ponúkajú špecializované
predajne BIŽUTÉRIA
podniku

Drobný tovar Bratislava

ENTREPRENOJ DROBNÝ
TOVAR BRATISLAVA
PROPNAS VASTAN
ELEKTON DE BIŽUTERIO
KAJ DE SPORTAJ
BEZONAJ.

Organizas s-ano Bohuslav Háva, Sokolovské nám. 14
460 01 Liberec

20.9.1980 - sabato Esperanto-rondeto Zelezný Brod
Zelezný Brod staeidomo de autobusoj 8,30 horo
25 km Zelezný Brod-Horská Kamenice-Jesenný-Vlasti-
boř-Jirkov-Štonminejo Bratřikov-Těpeře - Ze-
lezný Brod

15 km Zelezný Brod-Černická skála-Štonminejo Brat-
řikov-Těpeře-Zelezný Brod

Organizas s-ano Zdeněk Horna Brodce 765/58 46822
Zelezný Brod

Kiu bezonas detalajn informojn, skribu al la orga-
nizantoj.

ALTIRAJ ESP. ARANĜOJ EN S L O V A K I O

12.-25. 7.1980 Somera Esperanto-Lernejo Košice SELKO 80
Ĉe la valbaraĵo Dobšinska priehrada
aranĝas: Esperanto-Klubo en Košice
adreso: EK Dom umenia /Dr.E. Erby, 041 23 Košice

10.-16. 8.1980 Turisma Semajno en Slovaka Paradizo TUSE 80
Slovaka Paradizo
aranĝas: Esperanto-Klubo en Spišská Nová Ves
adreso: Peter Pavúk, ul.Konrádova 6/8 05201 Spišská
Nová Ves

Septembro 1980 Junulara seminario en Bystrá
aranĝas: Junulara sekcio de AE SSR kaj E-grupo Valaská
adreso: Stanó Marček, Hurbanova 4/11 03601 Martin

Oktoebro 1980 Organiza seminario en Žilina
aranĝas: Mezslovakia reg.komitato de AE SSR
adreso: Štefan Špiguth, Priehradná 14 03601 Martin -
Priekopa

Oktoebro 1980 Renkontiĝo de junaj esperantistoj el pioniraj
kaj bazlernejaj Esp. grupoj en Ž i l i n a
aranĝas: Junulara sekcio kaj E-rondeto en Žilina-Závo-
die
adreso: Miro Závodský, Čsl.brigády 63 01004 Žilina -
Závodie

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO en G Y U L A, Hungario

de la 6. - 12. 7.1980 jam la 18-an fojon. Ĉiuj interesuloj
deziru detalajn informojn aŭ rekte aliĝu ĉe Somera Esperanto
-Universitato H-5700 GYULA, TIT, 48-as u.11 Hungario.
Prezoj laŭ loĝkondiĉoj de 1400 ĝis 2000 Ftoj.

VIZITU LA ANTAŬKONGRESON DE U E A EN G D A Ŭ S K, Pollando

Vi konatiĝos kun kaŝuba folkloro kaj arto kaj ĝia specifa karaktero, kun beleco de Kaŝuba regiono, kun antikvaĵoj de la malnova urbo Gdańsk.

Programo de la Antaŭkongreso certigas al vi eblecon:

- ekscii kiamaniere per Esperanto diskonigi lokan kulturon,
- ekkoni parton de arta kongresa programo, kiun prezentos polaj artistoj,
- partopreni rican kulturan kaj turisman programon kune kun novaj kaj malnovaj ĝeamikoj.

D e t a l e :

La 27. 7.1980 16,00 horo: Inaŭguro de la Antaŭkongreso kun arta folkloro programo.

Ĝis la 1. 8.1980:

- dum la Seminario oni preparolos la temon "Utiligo de Esperanto por la diskonigo de loka kulturo"
- en Etnologia Muzeo oni vizitos ekspozicion de kaŝuba popola arto
- ĉe tendarfajro prezentos sin popolaj artistoj de diversaj regionoj
- Pupteatro "Rabcio" el Rabka prezentos spektaklon "Pri Zviritano Muzikanto"
- la antikvaĵojn de la urbo Gdańsk vi povos viziti laŭ tri libere elektitaj itineroj
- en Oliva vi povos admiri Katedralon kaj orgen-muzikon
- dum tradicia balo okazos prezentado de virina modo kun folkloraj motivoj

ALIGU TUJ PERE DE Ĉ E A - PREZO KĈS 990.-

Turismaj kondiĉoj dum la Antaŭkongreso: loĝado en Studenta hejmo /du-litaj ĉambroj/, manĝado en memserva manĝejo.

EL GDAŬSK AL STOKHOLMO oni povas veturi per pola pramo ROGA-LIN, kiu forveturas de la haveno en Gdańsk-Nowy Port-18,00 h m a r d e , ĵ a ŭ d e , d i m a n ĉ e . Al NYNESHAMN ĉe Stokholmo ĝi alvenas post 22 horoj.

P r e z o j :

La vojaĝbileto en unu direkto kostas	200 skr.
La vojaĝbileto en ambaŭ direktoj kostas	360 skr.
Dormloko	de 40 - 180 skr.
Loko por aŭtomobilo en unu direkto	225 skr.
Loko por aŭtomobilo en ambaŭ direktoj	405 skr.

Eksterlandanoj povas rezervi biletojn por la pramo pere de ĉiu turisma oficejo en propra lando.

SORĈAJ TAGOJ ĉe B A L T A M A R O

Polaj medicinistoj invitas vin, eksterlandajn ĝekolegojn, por komuna feriado ĉe Balta Maro. Medicinista rondo de PEA

organizas dum la V-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Ust-
ronie Morekie ekde la 1-a ĝis 8-a de junio 1980 integrigan-
ten renkonton.

Estus tre plezure pasigi tiun semajnon kune kun alilandaj
gekolegoj. Bonega okazo por interŝanĝi spertojn, bone ekko-
ni sin reciproke - eĉ amikiĝi.

Kiel pruvas la vivosperto, nur personaj interhomaj kontak-
toj garantias la plej bonan kunlaboron. T i a l ne preter-
lasu la unikan okazon kaj aligu tuj al la V-a Ĉebalta Espe-
ranto-Printempo /ĈEP/. Vi estos ĝoje bonvenaj!

ALIĜOJN AKCEPTAS Ĉ E A - prezo : 1190 Kčs

LA KONGRESO DE AE SSR PROKSIMIĜAS

Ĉi-foje la 8-a jam estos en P r e ŝ o v en la tagoj 27. -
29. 6.1980. Partoprenu aŭ minimume sendu vian bondeziron
al D-ro Andrej L u k á ĉ m Pištejiho str.27, 080 01 PŘEŠOV.

PERE DE Ĉ E A AL V A R N A KAJ S M O L J A N

Internacia Esperanto-kursejo en V a r n a

3. - 16.majo 1980	Feriaj Esperanto-kursoj	Prezo en Kčs	2150
17.- 30.majo	F. E. k.	"	2150
1. - 14.junio	F. E. k.	"	2450
16.- 29.junio	F. E. k.	"	2450
1. - 14.septembro	F. E. k.	"	2450
16.- 29.septembro	F. E. k.	"	2450
1. - 14.oktobro	F. E. k.	"	2150
16.- 29.oktobro	F. E. k.	"	2150
1. - 14.novembro	F. E. k.	"	1980
16.- 29.novembro	F. E. k.	"	1980
1. - 14.decembro	F. E. k.	"	1980
16.- 29.decembro	F. E. k.	"	1980
30.12.1980 - 3.1.1981	SILVESTRA BALO	"	1200

Kultur-turisma programo:

- Busekurso al Varna - vizito de akvario kaj la monumento de Vl. Varnenĉik.
- Busekurso al Balĉik - vizito de la botanika ĝardeno kaj la palaco de la rumana reĝino Maria.
- Kursoj de Esperanto - 4 horoj potage.
- Prelegoj kaj projekciado de diapozitivoj .
- Interkona kaj adiaŭa vesperoj.
- Amuzvesperoj kun diskoteko.
- Transporto de la stacidomo kaj la flughaveno ĝis la ripoz-
domo kaj reen.

Internacia Esperanto-kursejo en Smoljan

3. -16.majo 1980	Feriaj Esperanto-kursoj		
17.-30.majo	F. E. k.		
1. -14.junio	F. E. k.		
16.-29.junio	F. E. k.	por gejunuloj	
1. -14.julio	F. E. k.	por gelernantoj	
16.-29.julio	F. E. k.	/11-14 jaraj/	por gelernantoj
		/15-18 jaraj/	
1. -14.aŭgusto	F. E. k.		
16.-29.aŭgusto	F. E. k.		
1. -14.septembro	F. E. k.		
16.-29.septembro	F. E. k.		
1. -14.oktobro	Internacia kurso por Esperanto-ĉiĉeronoj kaj ekakursgvidantoj. Internacia konferenco de Turismaj Esperanto-Organizantoj		
16.-29.oktobro	Ora Esperanto-feriado		
1. -14.novembro	F. E. k.		
16.-29.novembro	F. E. k.		
1. -14.decembro	F. E. k.		
15.-28.decembro	F. E. k.		

Aldonaj servoj: du plenaj tagnoktoj en Sofio kaj Plovdiv kaj trarigardo de la urboj kaj transporto Sofio - Smoljan - Sofio.

Silvestra balo: a/ 29.12.1980 - 2.1.1981
b/ 28.12.1980 - 3.1.1981 kun la samaj aldonaj servoj.

Partoprenkotizoj:

- en 2-lita ĉambro	Kŝs 1930
- en 3-4-lita ĉambro	" 1764
- en 6-8-lita ĉambro	" 1596
- por la silvestra balo	" 840
- aldonaj servoj	" 840

Kultur-turisma programo:

- Busekskursoj al:

Smoljan - trarigardo de la urbo, vizito de la etnografia muzeo kaj planetario.

Pamporovo - vizito /per lifto/ al montosupro "Sne - Janka".

Trigrad - vizito al la groto kaj la subtera rivero.

Momcilo - vizito al la pentroarta galerio kaj muzeo.

- Kursoj de Esperanto - 4 horoj po tage.
- Prelegoj, projekciado de diapozitivaj k.a.
- Interkone kaj adiaua vesperoj.
- Amuzvesperoj kun diskoteko.



**POR LA INFANOJ
ESTAS BONA NUR TIO,
KIO ESTAS LA PLEJ BONA**

STERILIZITA FRUKTA NUTRAĴO
KUN KAZEJO, DESTINITA POR LA SUĈINFANOJ
EKDE LA KVINA MONATO DE LA AĜO, EN LA NOVA
KONVENA PAKUMO KUN LA DEPRENEBLA KORVILO,
FABRIKAS NACIA ENTREPRENO



JIHOCESKÁ FRUITA



BONVENON EN NIAJ RESTORACIOJ

- Restoracio "U Hpy, Sezimovo Ústí II.
- Restoracio "Lada" Soběslav
- Restoracio Planá nad Lužnicí
- Restoracio "Harachovka" Tábor
- Restoracio "Na Branšku" Tábor
- Restoracio "Záložna" Mladá Vožice
- Restoracio Bechyně
- Restoracio Slapy u Tábora
- Restoracio Dražice
- Restoracio KD Jistebnice



**RAPIDA KAJ BONA PRISERVO
VASTA SORTIMENTO
DE NE-ALKOHOLAJ TRINKAĴOJ**



JEDNOTA TÁBOR

INFORMOJ DE SEKRETARIO

En la populara revuo de la Germana demokratia respubliko "Wochenpost" /eldonkvanto 1,5 miliono/ aperis tutpaĝa artikolo de Sabine Herklotz "Spricht man noch Esperanto?"/Ĉu oni ankoraŭ parolas Esperanton?/.

Tre spritaj kaj objektiva artikolo povas esti ekzempla modelo ankoraŭ por niaj propagandistoj, kiuj ofte forgesas, ke oni vivas en la 20-a jarcento, en la tempo de la sciencteknika revolucio.

LETERO AL JAPANA E-INSTITUTO

La 15-an de jan.1980 forsendis la membroj de Esp.rondeto Opava jenan leteron:

Estimataj gesamideanoj!

Ni, membroj de Esp.rondeto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kun atentemo tralegis de vi eldonitan libron pri atombombo.

Ni konsentas, ke ĝi estas ne nur atesto pri pasinta okazajo, sed ĉefa silvoko al ĉiuj homoj, kiuj deziras trankvilan kaj feliĉan vivon por si mem, por siaj infanoj, samlandanoj kaj por tuta mondo.

Ĉiu, kiu konas vian libron, valoran dokumenton pri neripetenda realo en Hirosima kaj Nagasaki, ne povas forgesi tiunĉi daŭre minacantan fakton. Ni esperu, ke reale pensante mondo ne permesos ripeton de tiaj kontraŭhomaraj kruelaĵoj.

Ni dankas al vi pro eldono de la libro kaj sendas al vi korajn, fratecajn pacbatalajn salutojn.

D-rino Barandovská, por la ER de
ČES O p a v a

Vybudovanou kapacitu o 4 až 5 lůžkách pro nenáročný celo - roční ubytování bez zaopatření a stravy nabízí MS ČES v Boru u Tachova esperantistům z ČSSR za následujících podmínek a cenu :

1. poplatek za lůžko a den 10.-- Kčs, uhrazený předem za celou dobu pobytu
2. uhředit spotřebovanou elektrickou energii v době pobytu.
3. účastník se vezme vlastní lůžkové povlečení nebo spací pytle, bude si uklízet a případně vytápět

Ubytování v Esperanto-klubu v Boru, Malé náměstí 41, je výhodné pro autoturisty. Je možno podnikat jednodenní výlety do velké části západočeského kraje: Domažlicko, Stříbrsko, Tachovsko, Mariánské lázně, Konstantinovy lázně a pod..

V létě můžete využít blízkých borových lesů, rekreačního zařízení střediska Sycharák a rybníka Lebuťák. V zimě zase lze lyžovat na Přimďě, kde je sjezdovka s velkým i malým vlekaem, v Boru pak je kluziště s přírodním ledem.

Nabídky vyřizuje, prozatím v češtině, Zemánek Václav, 348
C2 B O R , Borská ul. 532, tel. 90344 .

Zájemcům o mezinárodní jazyk ESPERANTO z řad učitelů, rodičů, příznivců školy i bývalých žáků nabízíme možnost praxi - delných konzultací ve školním klubu Z D Š - Lindnerova ul. Praha 8 - libeň a to vždy v úterý do 17 ti do 17,30 ti hodin počínaje dnem 18.3.1980. Schůzky schválilo a umožnilo vedení školy a konají se po pracovní době vychovatelky družiny, která vás uvede do esperanta. Kurzy jsou bezplatné. Využijte této nabídky. Při návštěvě školy je nutné přezutí v přizemí budovy.

E.U.

KRONIKO

Dne 1. února 1980 zemřela ve věku 71 let PhDr. Vlasta Miškovská-Kozáková, emeritní vědecká pracovníce Pedagogického ústavu J. A. Komenského Čs. akademie věd v Praze. Pro esperantskou veřejnost mají význam její studie o Komenského projektech mezinárodního jazyka; i v poslední době sledovala práci našich i zahraničních odborníků v oblasti teorie a dějin mezinárodního jazyka s velkým zájmem.

La 24.12. 1979 forpasis s-ino Božena Fremlová s n ago de 78 jaroj, longjara

kaj oferema komitatano de EK Znojmo. Honoro al sia memoro! VR

Ni gratulas al niaj konataj sindonaj geesperantistoj kaj deziras al ili sannon, kontentecon kaj multe da sunaj tagoj en estontaj jaroj. Sian vivjubileon ĉatis Anežka Šustrová, Luiza Vítková, Ladislav Kynčl, Doc. Dr. Vl. Novobilský CSC., Ad. Staňura kaj František Paťera el Hořice.

La 24-an de aprilo 1980 gis - vivis en plena vigleco 80 jarojn Anna Kocová. La 31-ande majo farigis 70 jaraĝo Karel Skřivan. Ambau el LG Plzeň. Ni sincere gratulas kaj deziras multe da sano por ĉiuj plurej jaroj.

STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU Jilská 10, 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr. Jaromír Jermář CSc a Zdenko Křimský. Grafická úprava M. Lahašta./příloha Jaroslav Klement /. Tisk zajišťuje Těchnické ústředí knihoven. Předáno do tisku 27. března 1980. Dohledací pošta. Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Aditelství pošt Praha, pod čj. zn. P/1 - 1267/79 ze dne 6. dubna 1979.

EXPORT

STROJEXPORT

IMPORT

PRHA - CZECHOSLOVAKIA

VITKOVICE
BIOVIT

Reakciujo BIOVIT

La reakciujo BIOVIT estas destinita por la neintense ŝarĝata aktivigado dum la samtempa stabiligado de ŝlimoj. La aktivigaj kaj apartigaj procezoj okazas en la unusola cilindra ujo kun la vertikala akso kaj la diametro 6m, la volumeno de 100 ĝis 200m³. La areo de la apartigado estas 25m². La kapacito de la reakciujo ŝanĝebla per la alto de la aparato.



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ

- cazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TREBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o o



BALNEA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1

ĈEĤOSLOVAKIO

Tx: 122 215